ESPERANTO
INTERNACIA - LINGVO
LA LINGVO DE LA PACO
SIMPLA-LOGIKA
NEUTRALA

# GRVPo ESPERANTISTA "FIDO KAJ ESPERO" VALLADoLID

DOMICILIO SOCIAL: Mantería 31 - 2º. VALLADOLID.- (MARZO-ABRIL-MAYO-JUNIO)

## JUNTA GENERAL ANUAL.-

La Junta General anual, anunciada para el 19 febrero, domingo, hubo de ser aplazada para el siguiente domningo 26, por la falta del querum necesario, siendo en esta segunda ocasión, mayor la asistencia.

Leída el acta de la Junta General anterior, fué aprobada unanimamente. También fué aprobado el balance económico de 1983, con unos Ingresos de 370.607 pesetas y Gastos de 296.009 pesetas, con un Saldo al 31 diciembre 83 de 200.735 pesetas y un Superávit de 74.598 pesetas.

Igualmente, fué aprobado el presupuesto de Ingresos y Gastos del presente año, por importe de 240.000 pesetas.

También, fué leída y aprobada la memoria de actividades desarrolladas en el pasado año.

En el punto de renovación de cargos de la Junta Directiva, se barajaron varias listas con remodelación total o parcial de la misma, si bien, como algunos de los propuestos para cargos de un poco mas de responsabilidad, no aceptaron por variados motivos, da falta de tiempo, o por horarios incompatibles, etc. Convocada una nueva reunión, dado lo avanzado de la hora, ésta, se celebró el 27 de marzo, exclusivamente para tratar de resolver este asunto; el resultado fué igualmente negativo. Por ahora no se vislumbra una perspectiva halagüeña, salvo que haya personas dispuestas para aceptar alguno de los cargos de Presidente y Secretario.

&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=

## NEKROLOGO.-

DATIVO BLANCO SECO, kiu dejoris kiel kontrolisto ĉe la hispana fervojo, forpasis la 2-an de la monato aprilo en sia hejmo, je la 61-a aĝo, post plurmonata suferado. Li esperantistiĝis en la jaro 1963 kaj de tiam apartenis al la asocio Internacia Fervojisto.

Okaze de la 26-a nacia kongreso de Esperanto okazinta en Palencia dum la jaro 1965, li estis la Sekretario de la Loka Kongresa Komitato.

En la jaro 1970, li translogiĝis al Valladolid, kie li apartenis al la estraro de Fido kaj Espero, kiel Sekretario kaj Voĉdonanto.

Konvinkita esperantisto, li kongresis al la Internaciaj I.F.E.F.kongresoj de Italio, Finlando, Nederlando, Germanio kaj Hungario. La pasinta jaro kun la bileto kaj la valizo preparitaj, atendis la trajnon sur la perono de la loka stacidomo por kongresi en Belgio, sed pro subita malsaneto returnis hejmen. Ankaŭ la nuna jaro, aliĝis al tiu de Bulgario, sed kelkaj tagoj poste. li malsaniĝis neripareble.

La plej sinceran kondolencon al sia amata edzino kaj gefiloj, nome de la estraro de Fido kaj Espero, kaj ankaŭ de ĉiuj amikoj kaj samideanoj.

Ni scias ke perdis fidelan kaj estimatan amikon, kiu sendube restos por ĉiam en ĉies memoro, kaj deziras por sia tuta familio internan forton por s urporti tiun akran perdon.

Ke li pace ripozu. !

&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=

LA ESPERANTO KAJ LA FUTBALO.-

Hispana prelego prononcata de Antonio Gamboa.-
Traduko de Luis Martín Herrero.-

La kreitaj interesoj, ligataj al la imperio de la dolaro, estas la plej grandaj malamikoj de la lingvo Esperanto, ĉar por la triunfo de iu ajn kaŭzo, oni devas peri la mono. Kaj kiom da ĝi estas en la futbalo ?. - Multaj miloj de milionoj da dolaroj.

Unualoke, kontraŭ la ekspansio de laidiomo Esperanto, oni devas citi la du mondmilitoj; pro tio, oni devis ekkomenci du fojojn por disvastigi ĝin kiam la interkomunikadoj ĉesis, kaj dualoke, la kreitaj interesoj - elstarante sur ĉiuj, la dolaroj. Multaj milionoj oni interplektis, ĉar kontraŭ la profitoj de la futbalo, estas la sobreco de Esperanto, tial ke estas personoj kiuj diras: kiel krei internacian idiomon, kiam jam ekzistas la - plej gravaj, kiel la hispana, la franca, la angla, aŭ la germana, por citi nur kelkaj ?. Por la profesoroj kiuj scipovas ĉi idiomoj kaj al tiuj kiuj ĝia instruo havigas abundajn profitojn, neniel interesas al ili la Esperanto, kvamkam ĝia lernado estu tre facila kaj preciza; tiuj kiuj scias ke ĉi komprenilo tiel simpla je la atingo de ĉiuj inteligentecoj kaj sen nuanco aŭ dependenco de iu ajn nacieco, kun tio kio malpli interesas al ili estas la mono, kaj kiel fratoj de Don Quijote, por ilia meminstruo kaj diskonigo de la idiomo, pagas monon.

Kiel vi komprenas, ĉio estas kontraŭ kaj ĝis la samaj egoistoj ne scias esti tiel. Tamen, la konstanteco kaj la saĝeco alvenas iu ajn tage, tial ke la avanco iras lante (malrapide), sed sekure kaj pliiĝas la Universitatoj en la mondo en kiuj oni instruas Esperanton. Nuntempe pli ol 80, laŭ la revuo Esperanto de la monato decembro 1983.

Ne komentariu al la simultanaj tradukistoj ĉe la Onu kaj ĝenerale al ĉiuj pri la Esperanto kaj ĝia gramatiko, facilega kaj simpla. Tio kion ili deziregas, estas tro da malfacilaĵoj por agi libere, ofertante iliajn - servojn; pro tio, lernis la idiomojn pagante ĝian lernadon.

Ankoraŭ pli kontraŭ Esperanto. La eldonejoj eldonas multajn gramatikojn kaj vortarojn. Kion faros ĉi personoj ? Ĉar konstraŭstari definitive al la ideo de Universala Lingvo, por ke tiuj personoj oni ĝenu kaj studu dum multa da tempo kaj elspezo da mono, sen pensi ke kontraŭe oni povas fari ĝi la ellernado pli rapida kaj malkara.

La Esperanto estas la plej bona aliancano de la tempo, ĉar oni lernas ĝin multe pli antaŭe ol iu ajn alia lingvo kaj sen pagi apenaŭ pro tio, tial ke ĉiuj la Grupoj de Esperanto en la mondo, instruas ĝin senpage, nur apartenante kiel membro en ili.

El Esperanto, estas la lingvo ke ne apartenante al iu ajn lando, utilas por ĉiuj kaj estas tiu kiu en pli da lokoj de la mondo estas parolala.-

&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&

PRELEGOJ, OKAZE DE LA SEMAJNO PRI INTERNACIA AMIKECO.-

Mardo la 21-a februaro.- Luis Martín Herrero, parolis esperante, pri la tradukita temo "BILETO TRAKURAS LA EKONOMION". Estas la historio pri bileto el la Emisia Banko de Hispanio, valoranta 1.000 pesetojn, kiam ankoraŭ odoranta freŝan inkon el presejo, post la naskiĝo, iu pedelo iris al la Banko por serĉi monon por entrepreno, kun la celo pagi la salajron de la personaro.

La bileto aperis en luksa biletujo el rusa ledo, apartenanta al iu homo tre aranĝanta kiu akurate returnis hejmen kaj kune kun aliaj pli aĝaj fratoj, transdonis ilin al sia edzino por la hejmaj elspezoj.

Mia vesto ankoraŭ estas pura ! Sed tujsekve ekkomencis la rondiradetoj tra la mondo. La sama tago, mi iris unue en laktejon kie mi estis dum pluraj horoj, sed la laktisto deziris matenmanĝi, do, portis min al la panejo. Kaj trakuris de vendejoj al la hejmoj kaj inverse dum pluraj jaroj, aŭ por pagi la impostojn de la Fisko kaj tiel plu.

La leganto devas rekoni ke la mono havas ĝian originon en la Emisia Banko, cirkulas tra la entreprenoj, vendejoj kaj hejmoj kiel ŝparo aŭ rento kaj returnas al la kasoj de la Ŝtato kiel impostoj, por denove kaj fine, iri al la Emisia Banko, kiam oni decidas ĝian nevalidecon, post la determina limdato, pere de leĝo.

Ĵaŭdo la 23-a februaro.- Luis Hernández García, parolis esperantlingve, pri la temo "GENERACIAJ PROBLEMOJ".

Ludoviko diris ke laŭlonge de la historio ĉiam ekzistis generaciaj problemoj kaj mi ne povas ignori la realecon de la faktoj, sed pro diversaj cirkonstancoj, inter ili la pligrandigo de la social komunikiloj, la aspekto de la homa kunvivado fariĝis pli akra kaj intensa en la lastaj jardekoj.

Trarigardante la historion, sendube aperas plurajn ekzemplojn de la tiel nomata generaciaj problemoj. En la Biblio, troviĝas pluraj mortigoj kiuj iasence estis pro generaciaj problemoj kaj oni devas konstati ke en ĉi historio ludis gravan rolon unu el la ĉefaj elementoj kiuj kaŭzas la generaciajn problemojn kaj tiu estas la malkomprenemo. Ankaŭ la envio kaj la manko de fido.

Ludoviko Hernández, citis ankaŭ ekzemplojn pri la historio de la astronomio, de la pentrarto, de la vestado de la junularo kaj aliaj aferoj kiuj iaspece estas ribeloj kontraŭ la formalaĵoj de la aliaj pli aĝaj generacioj.

La Esperanto - Movado al kiu apartenas nomoj de la plej diversaj aĝo - grupoj ne estas aparte de ĉi tiu socia fenomeno kaj pri ĝi temo traktis la Universala Kongreso okazinta en Anwerpeno la jaron 1982.

Ankaŭ Ludoviko Hernández parolis pri la vivo de la Esperanto - Grupoj, dirante ke oni devas kombini la ligitecon kaj la liberecon kaj apliki en ĉi skalo al la rilatoj inter la junaj kaj ne junaj membroj.

Konkludis dirante ke oni devas profiti la novajn ideojn kaj labormetodoj kaj kunigi la generaciojn de la aĝuloj kaj de la mez-aĝuloj kaj de la junuloj, kunigante la spertojn de la aĝuloj kun la entuziasmo kaj laborkapablo de la junuloj kaj sendube, tiamaniere ni estos en la pl ej bona taŭga vojo por la progreso kaj evoluo de nia kara idiomo aŭ lingvo kiu estas Esperanto, nia interna ideo internacia.

Fortan aplaŭdadon ricevis Ludoviko de la ĉeestantaro.

&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&=&

## LA ESPERANTO KAJ LA LATIN.-

En la televida programo "La tarde" oni parolis pri la lingvo "LATIN", dirante ke ĝi utilas kiel internacia ligilo en la eŭropaj sesioj, tial ke ĝi havas neŭtralan spiriton kiel ĝi jam demonstris tion dum la mezepoko kaj pro tio utilas kiel kultura lingvo.

La prezentanto de la programo demandis alla invititoj ĉu la Latín estas universala kiel la lingvo Esperanto aŭ la angla ?. La latinistoj de la Centra Universitato, respondis ke la Latín utilas por la kultura interkomprenigo, sed ne por la popola interkomprenigo. Ankaŭ aldonis ke bezonas studi la novajn vortojn kiel telefono, video, kaj tiel plu.

Jes vere, la latina lingvo ne nur estas malfacilega kaj komplika por lerni ĝin, sed estas lingvo kiu estas morta de antaŭ pluraj jarcentoj, do, la eŭropaj aŭ internaciaj organismoj, bezonas lingvon kiel nia Esperanto, facila lernigilo por ĉiuj kaj riĉa je nuancoj kaj tre utila ilo por ĉiuj sociaj fenomenoj kaj taveloj de la kulturo de la tradukarto kaj de la sciencoj kaj tiel plu.-

## K O N G R E S O J.-

La 36-a internacia fervojista kongreso okazis ĉi jare en Slanĉev Brjag (suna Bordo) Bulgario de la 12-a ĝis la 18-a de la monato majo. La kongresanaro estis sufiĉe alta, pli ol 800 laŭ la kongresa bulteno.

Dum 15 tagoj en tiu monato la ĉeestantoj veturis senpage sur la tutal teritorio de la bulgaraj fervojoj.

Pluraj membroj de nia Grupo vojaĝis dum tri tagoj kaj duone fervoje por kongresi tien. Entute pli ol 4.000 da kilometroj apartenantaj al kvin landoj.-

La 44-a hispana nacia kongreso, kiel vi jam scias okazos ĉi jare dum la monato julio de la 6-a ĝis la 11-a en la andaluzia kaj belega kaj altira urbo Sevilla.

La programo traktos kiel ĉefa temo "TURISMO, ĈU SOCIA FENOMENO" ? kaj pri ĝi okazos seminario.

Kaj ĉiujare kaj kiel kutime anoj de Fido kaj Espero kongresos tien.

Ni esperas ke ĝi sukcesus.-

Ankaŭ dum la monato julio de la 15-a ĝis la 21-a okazos la 14-a amikeco-kongreso en la hispana mez-epoka kaj universale konata Santiago de Compostela, al kies urbo pilgrimas amasoj da pilgrimantoj okaze de Sankta Jaro. Anktaŭ la deziron de sukseco.-

## R E V U O J.-

Post preskaŭ duonjarcento, reaperas "NIA VIVO" organo de la aragona Grupo de Zaragoza "Frateco". La lasta numero -57-a- aperis en junio 1936 kaj poste nur aperis specialaj numeroj kiel tiu por memorigi la 50-an datrevenon de la fondo de la Socoeto.

La reapera numero apartenas al la decembra monato 1983, Pri ĝi ni devas diri ke estas skrupule presita, belaspekta kaj enhavas interesajn artikolojn tute verkitaj en Esperanto. Gratulon al la redaktoroj.